

la informilo

ISSN :
0291 -
6037

INFORMBULTENO  PRI ESPERANTO

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto :

KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIIO

FEDERATION CULTURELLE FRANCE-EST POUR L'ESPERANTO

MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE Ph. DESFORGES

27, Rue de la République, F-54000 NANCY


PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

NOUVELLE SERIE

trimestriel

3ème trimestre 1989

n° 67



ABONNEMENT

un an: 42 FF

jara abono

por eksterlando:

54 FF aŭ 15 R.K^oj

ANTO - FLASH... ESPERANTO - FLASH... ESPERANTO

TEMOIGNAGE

Mercredi 26 juillet 1989

Anne, espérantiste

MEUSE
Actualités

De retour du congrès mondial de la jeunesse espérantiste, elle témoigne.

Cinq cents jeunes ont passé une semaine ensemble, à Kerkrade, au Pays-Bas, venus d'une trentaine de pays des cinq continents. Leur point commun, l'espéranto, qui leur permet de briser les barrières linguistiques et de s'enrichir mutuellement. Anne, comme tous les ans depuis 1977, y était.

« C'est à l'occasion d'une exposition à Bar-le-Duc que j'ai connu l'espéranto, se souvient-elle. C'était en 1974. J'ai vraiment accroché et comme j'étais déjà intéressée par les langues, je m'y suis plongée complètement. »

Et ne le regrette pas... Aujourd'hui professeur d'espagnol, Anne a parcouru le monde au fil d'étapes, chez des espérantistes comme elle. Partout, elle trouvait, et trouve encore, des points de chute.

A Kerkrade, ils étaient une vingtaine de Français. Au



menu des discussions et colloques, les transports, la protection de l'environnement, les trains à grande vitesse et de nombreux thèmes d'actualité.

« Des Soviétiques de Léninograd et Létonie sont venus parler de ce qui se passe actuellement en URSS », explique Anne, qui apprécie beaucoup ces échanges.

« L'espéranto met tous les peuples sur un pied d'égalité, dit-elle, et se révèle un excellent moyen d'approcher les cultures minoritaires non véhiculées par l'anglais. »

Anne cite la Catalogne, mais aussi l'Amérique latine, « qui souffre des ravages de l'impérialisme américain ».

C'est à Cuba d'ailleurs que se tiendra le prochain congrès mondial de la jeunesse espérantiste. Le soir, l'heure était à la musique, au théâtre et à la danse. Anne a animé un atelier d'expression corporelle, elle a appris à danser les rythmes cubains.

Aujourd'hui, ils sont des milliers à parler l'espéranto dans le monde. Un groupe de députés européens se dit d'ores et déjà favorable à l'adoption de cette langue universelle, mais il reste une minorité. Cela n'empêche pas Anne de reconnaître que l'espéranto lui a ouvert les portes du monde, et apporté une richesse intérieure qu'elle n'aurait peut-être pas acquise sans.

L'année prochaine, elle ne manquera pas le rendez-vous de Cuba!

ECHOS DU 74ème CONGRES UNIVERSEL à BRIGHTON (Angleterre) ★

- 2268 participants de 54 pays;
- 112 réunions spécialisées (juristes, enseignants, mathématiciens, automobilistes, informaticiens, radio-amateurs etc);
- 12 conférences dont plusieurs sur la Grande-Bretagne;
- 3 pièces de théâtre: "La chatte sur le toit brulant" de Tennessee Williams par la troupe allemande "Kia koincido"; "Le Petit Prince" de Saint-Exupéry par la polonaise Barbara Lukaszewska; "Comment aiment les autres" de Alan Ayckbourn dans une traduction de William Auld;
- 3 concerts: rock avec le groupe slovaque Team; classique avec différents musiciens britanniques; populaire avec le groupe hollandais Kajto ;
- 1 duel pour savoir quelle langue répond le mieux à la communication internationale . A plaidé pour l'anglais le Prof. Honey, professeur d'anglais à l'université japonaise de Humamoto; pour l'espéranto, le Prof. John Wells, professeur de phonétique à l'Université de Londres ;
- 15 cours: d'anglais accéléré, de gallois, de gaélique; d'espéranto selon la méthode directe Cseh; pour enseignants selon la méthode de Zagreb; de sorobano (méthode japonaise de calcul);
- 272 heures de réunion de travail sans interpète!
- 5 nouveaux pays qui adhèrent à UEA: le Pakistan, la Côte d'Ivoire, l'URSS, la Lituanie et la Lettonie ;
- 33 enfants de 15 pays, encadrés par des jeunes de 14 à 19 ans pour une véritable éducation à la paix et à une conscience internationale ;
- 1 nouveau Président: John Wells, professeur de phonétique à l'université de Londres succède à Humphrey Tonkin, Président d'une université américaine;
- 6 bulletins spéciaux "La Kortega Cirkulero" pour informer les participants au jour le jour;
- 15 ethnies débattant sur la position des Albanais et des Serbes au Kosovo ;

A ces chiffres il conviendrait d'ajouter les innombrables conversations de couloir, les amitiés nouées ou retrouvées, les échanges entre responsables, la signature d'une convention écologique, la Journée de la Paix, celle de l'Ecole, les milliers de titres vendus au service de librairie, les débats sur la construction européenne ou la défense de l'Amazonie, les protestations contre le Service d'Immigration qui a interdit l'accès en Grande-Bretagne aux Africains.

- ★ UNE CREATION FRANCAISE PRIMEE: EVA se doit de stimuler la création littéraire et d'encourager les nouveaux talents originaux en espéranto. Georges Lagrange, bien connu dans les milieux de théâtre vient de recevoir le 1er prix du concours pour sa pièce "Inna". Peut-être sera-t-elle montée lors d'un prochain festival de UFE ?

24ème CONGRES CATALAN : réunis à Perpignan du 8 au 10 septembre, Catalans français et espagnols ont pu débattre de l'égalité linguistique en Europe. Rappelons que 50 millions d'Européens sont exclus du courant communautaire car leur langue maternelle n'est pas une des neuf langues officielles de la Communauté ! ★

- ★ CENTIEME NUMERO DES INFOS TELEPHONEES: en faisant le (1)48 87 07 42, il est possible d'obtenir des informations enregistrées par Jean-Pierre Danvy . Le numéro 100 vient d'être enregistré. Vous pouvez obtenir d'autres informations sur Minitel, 3615, code VAMP .

(ces différents communiqués informatifs sont extraits de "La lettre de l'espéranto", un service exclusif de l'Union Française pour l'Espéranto, à destination de tous les "médias" de langue française.)

☆ ESPERANTO FOR HOPE: lancé à Dublin en présence de l'auteur, Maire Mullarney, de l'éditeur, Poolberg, Dublin, du Ministre de la Culture et de diverses personnalités irlandaises ou espérantistes, cet ouvrage de 185 pages devrait trouver un écho favorable parmi les anglophones qui veulent connaître la " nouvelle façon d'apprendre le langage de la paix " .

LE TROPHEE FYNES à ELNA : la coupe qui récompense la meilleure association nationale est allée cette année à l' association nord-américaine pour son information auprès du personnel de l'ONU et l'édition d'un nouveau manuel " Esperanto, learning and using the international language" de David Richardson .

COURS DE PHONETIQUE A LA TELE DE CANTON : malgré les événements du printemps dernier, un cours de phonétique de l'espéranto est programé par la télévision de Canton (Chine). Quatre séquences de 20 minutes chacune sont présentées chaque semaine, et ce pendant deux ans à dater du 3 mai .

☆ ARTS TRADITIONNELS JAPONAIS : huit places ont été réservées pour les espérantistes qui voudront s'initier aux arts traditionnels japonais. Les cours sont organisés à Kameoka (Japon) par Oomoto. Une centaine de responsables doit encadrer les élèves en difficulté .

CATHOLIQUES EN PELERINAGE OU CONGRES: à Bocca di Magra (Italie) du 8 au 12 septembre, ou en pèlerinage à Banneux (Belgique), le 10, les catholiques ont fait vivre le thème "Se comprendre entre peuples".

CYBERNETIQUE ET LANGUES HUMAINES: tel était le thème du 12ème congrès international de cybernétique qui s'est tenu à Namur (Belgique) du 21 au 25 août en trois langues: français, anglais, espéranto .

☆ CAMP SPELEO en HONGRIE : après le succès du camp précédent, les spéléos espérantistes se sont retrouvés dans les grottes des atlas du 20 au 25 août pour faire de l'exploration sous-terrainne mais aussi rédiger un dictionnaire spécialisé ainsi qu'un bulletin "Vesperko".

PIZZERIA "L'Espéranto" SUR LA ROUTE DES VACANCES : près de Martigues (6 du R) à Ponteau Saint-Pierre, Quartier Beaune Longue vient de s'ouvrir un restaurant-pizzeria "L'Espéranto" . Les propriétaires ont choisi ce nom car ils proposent une cuisine internationale et que l'art culinaire est aussi un moyen de communication .

☆ NOUVELLE MAISON D'EDITION à WIEN (Autriche) : le Musée de l'Espéranto à Vienne possède des documents inestimables datant de la naissance de l'espéranto . Afin de les faire connaître à un large public , une équipe de jeunes dynamiques vient de créer sa propre entreprise Pro Esperanto pour éditer ou rééditer des oeuvres originales . Pro Esperanto , Postfach 28 A-1014 WIEN

CLUB PRIVE à BUDAPEST : dans le plus pur esprit britannique, les Hongrois viennent d'ouvrir un club privé pour des discussions entre amis, conférences , rencontres et hébergement . Espereje , H-1076 BUDAPEST , Peternb Sandor U 23; tel 31-1-288-258

JEAN-CHARLES APPREND L'ESPERANTO : parue dans "Le Figaro" du 26.6 cette remarque du maître des cancre: "Pendant la campagne des élections européennes, j'ai constaté à regret que personne n'avait envisagé le principe d'une langue commune. Je donne l'exemple".

☆ Le "Pasporta Servo" NOUVEAU EST ARRIVE : dans l'édition 89 du recueil d'adresses d'hébergement gratuit chez l'habitant, on note l'entrée des pays africains (Algérie et Tunisie, Bénin, Cameroun, Côte d'Ivoire, Madagascar, Sénégal et Afrique du Sud) sans parler des adresses en chinois, compostées gracieusement par la firme Chinterpret à Groningen.

LES NOUVELLES DE MOSCOU AUSSI : en route pour le congrès universel à Brighton, les Soviétiques ont déposé le numéro 0 de "Les Nouvelles de Moscou" . Edité en neuf langues par l'agence de presse Novosti, ce journal pourra paraître régulièrement en esperanto si la demande s'en fait sentir .

LA PSYCHOLOGIE DU TOURISME INTERNATIONAL : "Psikologia problemaro de internacia turismo . Psychospēczna problematyka turystyki Międzynarodowej" est publié par l'Académie des Sciences de San Marino, ISBN 83-85033-05-x . Alors que les voyages à l'étranger se multiplient, que les professionnels du tourisme ont été avertis par la conférence de Manille, il est intéressant d'avoir l'avis d'un psychologue .

☆

BANDE MUSICALE DU ZAIRE : un groupe de musiciens du Bas-Zaire propose la bande musicale de son concert contre dix coupons-réponse internationaux . Boma Esperanto-Pondo, Mafuila -Tunga , Havomo, BP 34, BOMA II, Bas-Zaire .

☆ RENCONTRES DES TROIS FRONTIERES : alors que les Autrichiens, Italiens et Yougoslaves se sont retrouvés à Arnoldstein (Autriche) du 8 au 10 septembre, Belges, Allemands et Hollandais ont rendez-vous le 17 septembre à Polleur (Belgique) pour l'inauguration d'un monument aux Droits de l'Homme et aux Libertés. Ils pourr ont assister à une conférence de Moritz UJ (RFA), rédacteur de la revue "Etnismo" sur le thème "Les minorités ethniques jouissent-elles des droits de l'homme?" et visiter le chateau de Franchimont où le 16 septembre 1789 a été proclamée la Déclaration des Droits de l'Homme. Renseignements: José Jacob 19.32/ 87 22 10 79

FETE DES ASSOCIATIONS : au Perreux (Val de Marne) le 16 Septembre, à Thionville (Moselle) avec la participation de Radio-Beffroi) le 24, à Pau le 30 Septembre, à Draveil (Essonne) les 7 et 8 Octobre, les clubs d'esperanto animent un stand.

☆ "La Marseillaise" AUSSI : dans le cadre du bicentenaire de la Révolution française, les Hongrois nous ont fait parvenir la traduction en hongrois et esperanto de l'hymne français. Pour le concours national d'une "Marseillaise" pacifique, un habitant de Saint-Dizier, Michel Goulet a consacré une strophe à l'esperanto

☆

☆ L'ESPERANTO : UN BAIN DE JOUVENCE ? c'est ce qu'on pourrait croire ! Mme Alice MEIER (Canada) a cent ans et a participé au 8ème congrès d'esperanto . Marthe Colliander (Suède) est aussi centenaire . La doyenne des Européens, l'Arlésienne figure dans les documents du groupe d'esperanto d'Arles de 1905 ! Quant à Mme Nielsen, Danoise de 82 ans, elle a étonné tous les journalistes qu'elle a rencontrés lors de sa tournée de conférences en France par son dynamisme, son enthousiasme et sa jeunesse . Pas surprenant puisque l'esperanto fournit un but , développe une activité intellectuelle et multiplie les contacts entre les générations .

VIVRE EN EUSKADI : lors du 49ème congrès espagnol qui s'est tenu à Bilbao du 17 au 22 juillet, les participants ont assisté à la première du film en esperanto "Vivre au Pays-Basque " .

Gray au coeur de l'Europe espérantophone

Le musée espéranto est plus connu à l'étranger qu'à Gray.

Impossible de ne pas remarquer le musée espéranto installé à la Maison pour tous. Il occupe dix salles en face de l'escalier conduisant au premier étage. Parmi le millier de visiteurs qui chaque année pousse la porte de bois, on dénombre plus d'étrangers que de Grayois.

Ce phénomène paradoxal n'est pas la résultante d'un manque de publicité sur le plan local. Gray compte une vaste palette d'objets et indications rappelant que la ville compte dans ses murs l'un

des plus importants musées de l'espéranto au monde.

Chantre local de la langue vivante créé par le docteur polonais Zamenhof à partir des racines communes aux langues européennes les plus parlées. M. Géo Junier se dépense sans compter pour faire connaître ce qu'il définit « *comme une synthèse des principaux types de langue, un langage planifié facilement et immédiatement utilisable* ». Son message n'est peut-être pas encore compris...

« Les victoires à venir de l'espéranto »

A la Maison pour tous, le Nacia Esperanto muzeo de la franca esperantistaro affiche ses richesses documentaires, son originalité, son intérêt sur 230 m².

M. Junier et son comité ont invité dans leur vaste domaine où s'alignent entre autres douze cents titres de revues et six mille titres la nouvelle équipe municipale.

Histoire de lui transmettre la fibre espérantiste et lui rappeler à la veille de l'échéance de 1992, « la neutralité de l'espéranto, langue au service de la libre circulation des hommes et des idées ». Gray se trouve bien sûr au centre de l'Europe espérantophone.

La faction de combat menée par M. Junier parle volontiers « des victoires à venir de l'espéranto ». Victoires face aux partisans du multilinguisme bien entendu et face à ceux qui critiquent sans connaître le moyen d'expression favori des hommes et des femmes porteurs de l'étoile verte.

(*"L'EST REPUBLICAIN"*)

Voulez-vous, comme nous l'avons fait nous-même, passer une agréable journée à GRAY? Monsieur JUNIER et ses amis se feront un plaisir de vous faire découvrir non seulement le musée de l'espéranto mais également les quartiers les plus pittoresques de cette jolie ville. Ecrire ou téléphoner:

M. Géo JUNIER, 67bis, Fbg Perrières, 70100 GRAY
tél.: 84 65 11 73

UN BULLETIN DE VOTE ORIGINAL... mais au contenu pertinent!
(découvert dans l'urne de St-Sauveur, département 70)



"En l'absence d'une proposition de langue commune de communication, accessible à tous et non hégémonique, qui permettrait d'être compris partout et par toute la population des 12 pays, j'aurais aimé pouvoir voter pour une liste de candidats parlant les 9 langues de la Communauté..."

A l'heure où tous les enfants vont devoir ingurgiter les langues étrangères, alors que beaucoup ont déjà bien du mal à assimiler le français, comment est-il possible de se présenter aux élections européennes sans être polyglotte?

Puisque l'exemple doit venir d'en-haut, il serait bon que l'on sache combien de langues étrangères sont parlées, couramment, par Messieurs les Ministres et par Monsieur le Président de la République."

PRI LA EUROPAN PARLAMENTANOJ KAJ ESPERANTO...

Sekve al letero de la prezidanto kaj vic-prezidanto de nia Federacio al la eŭropaj parlamentanoj loĝantaj en la departementoj de la Federacio, jen respondo de Solange FERNEX ("Verduloj"):

"...Solange Fernex, député européen vert, vous remercie pour votre lettre de félicitation adressée à Antoine WAECHTER, vous assure du soutien des Verts au Parlement Européen à toute initiative visant à développer la compréhension entre les personnes et les peuples et la promotion de l'espéranto, se réjouit d'avoir un jour le temps d'approfondir personnellement la connaissance de l'espéranto."

Aldone al la letero ŝi sendis la tekston de unu el siaj intervenoj ĉe la parlamento.

E. LUDWIG



ALTNIVELA MONDA EVENTO

74-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Okazinta en Brajtono de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1989, kun kongresa temo:
Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado

La granda konferencejo Brajtona Centro estis la kongresejo de la ĉi-jara Universala Kongreso, ŝajne senpage disponigita al UEA, sed bedaŭrinde kun nur angla-lingvaj deĵorantoj, *do tute ne internaciaj*. Ĝi situis ĉe strato fronte al mar-bordo, kie troviĝis multaj hoteloj. La oficiala malfermo de la kongreso okazis la 30-an de julio en la salonego Zamenhof antaŭ pli ol 2000 kongresanoj kun la helpo de la livrea anoncisto de Brajtono (*kun terure angla prononco*). Humphrey Tonkin gvidis sian lastan solenan inaŭguron kiel prezidinto de UEA, kaj anoncis ke UEA havas novan prezidanton, nome John WELLS, profesoro pri fonetiko en la Universitato de Londono. Poste sekvis la kutimaj salutoj de la landaj Esperanto-asocioj. Tiu inaŭguro ŝajnis malpli pompa, ol mi jam spertis en aliaj kongresoj, eble ĉar la salutoj de la landaj reprezentantoj estis jam okazintaj en la antaŭa tago dum Urbeŝtra Akcepto.

La apuda hotelo Metropole ankaŭ disponigis kelkajn salonojn, krome la Nacia Vespero, la Koncerto la Teatraĵo la Internacia Arta Vespero, okazis en la Granda Teatrejo. Kiam la ceteraj programeroj ne plu okazis en la kongresejo sed en la Granda Teatrejo, *por la distraj vesperoj ekzemple*, tiam la kongresanoj spertis la malagrabraĵon esti forpelitaj de la kongresejo-mem. *Ofte je la 19-a horo*.

Unu el la plej gravaj kunsidoj estis la debato pri Esperanto kaj la angla. Ĝi okazis mardo en la salono Lapenna inter profesoro Honey, kiu instruas la anglan lingvon en Japanio kaj la nova prezidanto de UEA kun la temo Ĉu Esperanto Ĉu la angla estas la solvo de la monda lingvo-problemo. La salono estis eĉ tro malgranda kaj parto de la publiko devis eksidi sur-planke.

Enkonduke Wells uzante la kongresan temon emfazis ke 10% de la homaro parolas la anglan lingvon, sed tio signifas ke 90% ne parolas ĝin. En tiaj cirkonstancoj estas maljuste kaj malegale favorigi tiujn 10% kaj postuli de la aliaj 90% la tutan klopodon lerni malfacilan lingvon kia estas la angla lingvo. Solvi la mondan lingvan problemon per la angla estas malracie kaj maljuste. Profesoro Honey tuj avertis la publikon, ke li pergajnas sian vivon per instruado de la angla. Li agnoskis ke la angla lingvo mortigas ĉiu-semajne unu lingvon en la mondo, ke ĝi jam mortigis plurajn aŭ ke ĝi infektas gravajn lingvojn kiel ekzemple la francan. Sed li aldonis ke eĉ se estas maljuste, ke la angla estu la lingvo de internacia komunikado, ĝi nun tio estas; ni ne povas ŝanĝi la faktan realon. Jes, la angla estas malfacila lingvo por afrikanoj kaj azianoj, sed Esperanto, kiu estas plene ligita al la eŭropa kulturo (*do ja kultura lingvo*) ja estas same malfacila. Krome, se Esperanton efektive parolus dekoj da milionoj de homoj dise tra la mondo, ĝi fariĝus same malregula kaj disdialektiĝus kiel la angla.

Al tia argumentado respondis Wells, ke estas malĝuste aserti ke Esperanto same malfacilas kiel la angla, kaj por pruvi tion li detale montris per trafikaj ekzemploj kion malfacila kaj malregula estas la angla lingvo, ĉu en la prononco, ĉu en la ortografio aŭ en la malinternacieco de ĝia vortprovizo. Pro simileco de vortprononco, franca piloto en Parizo miskomprenis *surteriĝu* anstataŭ *refoje rondiru*, tial la angla povas eĉ konduki al katastrofoj. Krome Esperanto ne disdialektiĝos en mondo, kie amaskomunikiloj pli kaj pli proksimigas la homojn.

Poste respondis pluraj aŭkultantoj el la publiko. D-ro Bormann aldonis, ke la angla lingvo ne nur mortigas lingvojn sed ĝi ankaŭ mortigas la eblon de interkompreniĝado de najbarlandaj civitanoj. En Germanio la angla estas la unua fremd-lingvo instruata, tio malhelpas al lernantoj en la proksimeco de Danlando, Nederlando, Francio ktp lerni la najbaran lingvon. Se Esperanto estus instruata kiel unua lingvo, tiam restus pli da tempo por la lernado de la najbar-landa lingvo. Aparte sprita estis la interveno de S-ro So Gilsu, el Japanio.

Al demando kion da tempo afrikanoj aŭ azianoj devas oferi por la lernado de la angla lingvo kaj kion dum-tempe lernas la anglaj lernejoj, profesoro Honey respondis interalie, ke laŭ la cirkonstancoj kaj la kapablo de la instruanto necesas 5 ĝis 6 jaroj por lerni la anglan. Sed li konfesis, ke la 6 jaroj dum kiuj la japanaj mezlernejoj lernas ĝin estas preskaŭ plene perdita tempo. Dume la anglaj lernejoj stulte kaj arogante rifuzas lerni la lingvon de iu ajn alia. 80% de la francaj lernejoj lernas la anglan sed nur 40% de anglaj

lernejanoj lernas fremd-lingvon, kiu plej supozeble estas la franca kaj kvankam ili ĝenerale havas bonan instruadon, ili verŝajne neniam uzos la francan en iu ajn pli granda kunteksto, simple ĉar anglo-parolanto ie ajn en la mondo trovos homojn, kiuj parolas la anglan, kio absolute ne instigas al lernado de iu ajn fremda lingvo.

Fine profesoro Honey jene konkludis sian kontraŭstaron al Esperanto. Esperanto simple venis tro malfrue al la aŭtobuso. Se ĉi-tiu debato estus okazinta antaŭ 50 jaroj, mi estus ĉe via flanko. Se Esperanto estus efektive parolata de granda nombro da homoj, tiam en ĝi evoluus ĉiuj malfortoj, kiuj ĝuste laŭ John Wells malkvalifikas la anglan lingvon. La angla ne devus esti la monda lingvo sed hazarde ĝi fariĝis tio. Ĉie en la mondo estas homoj, kiuj kun grandaj streboj lernas la anglan lingvon. En Afriko kaj en multaj partoj de la mondo eĉ en Orienta Eŭropo oni konsideras la anglan kiel liberigo-lingvon.

Do ĉu la mondo devas akcepti la arogantan kaj sufokantan anglan imperiismon per la naŭza altrudiĝo de la angla lingvo, sen prikonsideri ĉu ĝi estas taŭga, ĉu ĝi povas doni egalecon kaj neŭtralecon, do pli da justeco en la internacia komunikado? Tial Wells konkludis dirante, ke ni ne akceptu la mondon, kia ĝi estas, sed prefere ni klopodu ŝanĝi ĝin, por pli da egaleco kaj da justeco en la internacia komunikado pere de neŭtrala lingvo Esperanto. Kompreneble neniu konvinkiĝis per la argumentoj de profesoro Honey, kiu kiel sportisma malvinkinto, tamen ricevis malavaran aplaŭdon.

Merkrede okazis la tut-taga ekskurso. Per aŭtobuso ni atingis la palacon *Hampton Court*, kiu situas apud Londono. Post rapida vizito ni kviete boatvojaĝis sur Tamizo apud vico da pejzaĝaj kaj historiaj vidindaĵoj. Dum la krozado post iom da malpaciencaĵo kaj malsatiĝo ni povis frandi diversajn bongustaĵojn, ekzemple salmaĵo, meleagraĵo, bovaĵo, ŝinko, nekutimaj salatoj kaj divers-specaj kukoj. Post transiro de pluraj kluzoj, ni atingis la grandiozan kastelon Windsor, kie ni povis vidi la tipajn gardistojn, kiuj de tempo al tempo aŭtomate paŝadis kaj poste senmove restis starantaj, kvazaŭ robotoj. Tamen kelkaj turistoj, kiuj aŭdacis transpaŝi iun linion, sukcesis kolerigi la gardiston, kiu tiam per pied-batoj kaj ia bruo provis atentigi pri la malpermesata transiro. La demando restis, ĉu admiri ilin, ĉu kompati ilin, tamen tiom da vaneco. Sed en reĝlando necesas ja respekti la reĝajn tradiciojn kaj fantaziojn. La ekskurso finiĝis per aŭtobusa reveturado al Brajtono.

Samvespere okazis la junulara vespero en la salono Zamenhof. Temis pri lumspektakla rokkoncerto, pri kiu mi malmulton povos skribi, ĉar mi sukcesis elteni la laŭtegan bruegon nur dum 10 sekundoj! La rokgrupo estis Teamo el Ĉeĥoslovakio.

Ege interesa estis la teatraĵo Kiel amas aliuloj, kiu okazis ĵaŭde vespere. Ĝia apartaĵo estis ĉefe la enscenigo. La scenejo restis senĝanĝa tra la kvar scenoj kaj reprezentis la ĉambrojn de du apartaj paroj. La meblaro kaj ofte, la homoj, estas intermiksita. La intrigo disvolviĝis dum ĵaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo, sed plej inĝenia estis tiu en Akto 1, kie Sceno 2 okazis samtempe ĵaŭdon kaj vendredon vespere. Malgraŭ tiu mistifikado, ĉio iĝis klara dum la progreso de la teatraĵo.

Dum publika kunveno de la Akademio okazis pluraj kontraŭstaroj al la listo de landonomoj, pri kiu la Akademio ĵus decidis post sesjara korespondado. La plej trafa estis farita de korea reprezentanto, ĉar la Akademio decidis, ke Koreo estu la landnomo. Li prave kaj logike argumentis, ke la landnomo estu Koreio same kiel Japanio, Ĉinio, kaj ties loĝantoj koreoj same kiel japanoj, ĉinoj. Do kunklude koreo estas loĝanto de Koreio same kiel franco de Francio.

La kongreso finiĝis sabate matene dum la Solena Fermo. Tiam sin prezentis la nova komitato de UEA, en kiu okazis relative multe da ŝanĝoj. Sed pri tio verŝajne la organo de UEA pli detale raportos.

Ekzistas multaj manieroj partopreni Universalan Kongreson. Eblas ĉefe turismi, aŭ serioze partopreni plej multe da kunsidoj, ĉu fakaj, ĉu literaturaj, sciencaj, ĉu movadaj, aŭ renkontiĝi kun konataj amikoj aŭ konatiĝi kun novaj el novaj landoj. Krome ne eblas ĉeesti ĉiujn kunvenojn, ĉar multaj okazas semtempe, necesas do fari kelkfoje drastan selektaton kaj eĉ rezigni pri alloga prelego aŭ kunveno por povi partopreni alian. Tial verŝajne ĉiu kongresano partoprenis kaj spertis la kongreson malsam-maniere. Pro tio ĉi-tiu mia raporto ne povas esti plene objektiva, bonvolu do ĝin akcepti kiel tia. Ĝi estas nur kelkaj spertoj, travivaĵoj kaj rememoroj de unu el la 2268 aliĝintoj de ĉi-tiu Universala Kongreso en Brajtono 1989.

GRANDA SUKCESO DE LA TUTMONDA JUNULAR-KONGRESO


Tre proksime de nia regiono, en la sud-orienta pinto de NEDERLANDO, je 100 metroj de Federacia Respubliko Germana, okazis tiu grandioza Kongreso de T.E.J.O.

Ĉirkaŭ 500 homoj daŭre ĉeestis, sed entute 700 venis, almenaŭ por vizito. Jen do, I.J.-K° en Okcidenta Eŭropo atingis proporciojn de Orient-Eŭropa I.J.-K°. Inter la ĉirkaŭ 30 deven-landoj aparte menciindas Litovio kaj Rusio (Sovetunio).

Multaj tendumis sed la L.K.K. (organizantaro) tamen devis aldoni multajn litojn en la ĉambrojn... Per tiu kaj per multaj aliaj ideoj, klopodoj kaj streboj la junaj nederlandaj organizantoj liveris kongreson mult-rilate sukcesan... tre feliĉan kaj riĉigan semajnon ĉiuj! ne nur la partoprenantaro: la taga, vespera kaj nokta programoj estis mirige ampleksaj, buntaj kaj diversaj. Oni sentis sin samtempe en muzika festivalo, sport-staĝo, seminario pri "transporto", amika feriado, festado!...

semajnon por ĉiuj! Abundis ja ne nur la partoprenantaro: la taga, vespera kaj nokta programoj estis mirige ampleksaj, buntaj kaj diversaj. Oni sentis sin samtempe en muzika festivalo, sport-staĝo, seminario pri "transporto", amikara feriado, festado...

Sed "en Kongreso" sentis sin nur la komitatanoj de TEJO; kiel kutime ili oferis parton de sia amuza-tempo por reprezenti sian landan asocion kaj antaŭenigi per diskutoj kaj voĉdonoj la agadon de TEJO, la Junularan E°-Movadon. Ili elektis novan estraron; el la antaŭa nur restas la prezidanto, Jan KOŠMALUK. Plej ofereme, la estraranoj ofte kun-sidis ankaŭ nokte.

TRANSPORTO.. kaj medi-protektado, rapidegaj trajnoj en diversaj landoj, kiel ripari biciklon, estonta magnet-levado, transporto en la tria mondo... jen kelkaj el la aspektoj pritraktitaj de fakuloj kadre de la kongresa temo.

Dume aliaj instruis ĵongladon, korbopilkon, mem-defendadon, dancadon, manlaborojn, pentroarton sur vizaĝoj (ne mirige do, ke ĉiutage aperis kelkaj vizaĝoj transformitaj en fajnajn art-verkojn!).

VESPERE oni spektis jen kanzonprezenton, jen piano-koncerton, lumbild-rakonton, internacian orkestron aŭ koruson. Sed tio ofte estis nur la unua vespera programero; inter la 23a kaj la 3a horo proksimume okazis plej ofte danciga koncerto: kariban muzikon ludis grupo el Nederlandaj Antiloj dum la "Nacia Vespero", la sola ne-esperantista grupo de la semajno; rok-muzikon ludis kaj kantis "Amplifiki", jam fama, iom ali-formita, trafante la koron de la junaj esperantistoj; "Persone", el Nord-Eŭropo, kun altkvalitaj tekstoj, muziko kaj ludado; fine kaj kulmine "TEAM", profesia slovaka grupo. Noktemuloj poste plu-dancadis en diskejo, lastan nokton, eĉ ĝis matenmanĝo!

La ekskurso provizis en la bela urbo Maastricht diversajn vizit-eblecojn, de ŝipumo sur Mozo ĝis modern-arta ekspozicio; en bela eks-preĝejo okazis vespermanĝo kaj danca kaj kanta-muzika spektakloj.

Nu ja, okazis cetere bunta, subsuna sport-festo, kaj... kaj... tiuj, kiuj jam kongresumis, scias, ke ne eblas listigi ĉiujn formalajn okazaĵojn kaj precipe ĉiujn spontanajn amuziĝojn kaj aranĝojn, kiujn estigas kunesto de gejunuloj el plej diversaj landoj.

La venontan I.J.K°n organizas la E°-junularo de KUBO... do certé ĝi estos ankoraŭ pli danciga kaj varm-etosa...

Anne AMBLES

BETSCHDORF


En mia vilaĝo estis akceptitaj gesamideanoj el Hungario, Germanio kaj Anglujo.

Iun dimanĉon grupo el RASTATT kaj KARLSRUHE biciklis ĉi-tien okaze de "kafoklaĉo". Ĉiuj temoj estis elvokitaj, gramatiko, sorabano... kaj ĉefe tiu de la estonta ebleco kunlabori. Bedaŭrinde "ŝnure pluvegis"! Mi atendis por pretigi la tablon en la ĝardeno, sed Sankta Petro forgesis fermi la ĉielajn kranojn! Mi devis rezigni kaj instalas ĝin en la manĝoĉambro. Mi estis ĵus vestanta mian pluvmantelon por akcepti la biciklantojn, kiam alvenis la unua, malseka kiel spongo!! La aliaj sekvis, la flagportanto unue, tiom malsekaj kiom la unua. Kion fari? La ŝuoj estis transformitaj en laĝetoj, kie la piedoj sin banis, la akvo fluis laŭlonge de la manteloj similante rivereton... Rapide mi ekflamis fajron por sekigi ŝuojn, ĉemizojn, pantalonojn, kiujn ni pendigis ĉirkaŭ la forno, eĉ ĉe muro. Duone vestitaj la kuraĝaj biciklantoj sidis ĉe tablo kaj gustumis kukojn, trinkante varman kafon aŭ teon. Kompreneble mi pruntedonis strangajn pantalonojn de miaj filoj, ŝuojn malnovajn.. Spite al tio ni "klačis" ĝoje, dum la ŝtrumpetoj ornamis la seĝojn, por ke ĉiuj havu sekajn vestaĵojn por rehem-bicikli!

*Sincere mi gratulas ilin pro tiom da kuraĝo kaj dankas ilin pro la ĝojo ricevita.
Tiu "kafoklaŭdo" restos neforgesebla.*

Odette SCHEIDEL

EĤOJ EL LA PEDAGOGIA SEMINARIO DE LA CHAUX-DE-FONDS



De la 10a ĝis la 22a de julio 1989 okazis la "Dua Intensiva Metodika Seminario" de UEA-ILEI, en la Kultura Centro Esperantista de LA CHAUX-DE-FONDS. Partoprenis ĝin 10 ge-esperantistoj el 6 landoj: Francio, Italio, Jugoslavio, Svislando, Alĝerio kaj Koreujo.

Dum tiuj du semajnoj, laborante ses horojn ĉiutage, sub la gvidado de Rektoro Irena SZANSER, ili ricevis formigadon teoriant, pedagogian, psikologian kaj praktikan.

Dum tiuj du semajnoj, laborante ses horojn ĉiutage sub la gvidado de Rektoro Irena SZANSER, ili ricevis formigadon teoriant, pedagogian, psikologian kaj praktikan.

Tiel ni praktikis jenajn temojn: psikologia historio de la fremdlingva instruado, ekzameno de diversaj metodoj pere de video-bendoj, preparo de model-lecionoj (ĵurnalo en klas-ĉambro, detala hor-skizo kaj uzo de diversaj instru-teknikoj).

La rezulto de tiu seminario estis ekzameno konsistanta el du partoj:

- publika modelleciono 20-minuta antaŭ "realaj" lernantoj.

- teoria demandaro psikologia, pedagogia kaj teoria. Tiu ekzameno estas agnoskita de UEA-ILEI kaj rajtigas la sukcesintojn gvidi internaciajn Esperanto-kursojn.

La etoso en la grupo estis bona, ĉiuj laboris fervore sub la gvidado de Irena SZANSER, Claude GACOND kaj Mireille GROSJEAN. Ĉiuj partoprenantoj sukcesis la ekzamenon.

Catherine ROUX

NIA PERKORESPONDA KURSO FRUKTIĜAS



Dum la ĵusa lernjaro ni dissendis al la regiona gazetaro 61 komunikaĵojn. Ni povis kontroli la aperon de nur 25. Ni respondis al 114 informpetoj. Ni finis la lernjaron kun 46 gelernantoj (lastjare 35). El ili, ĝis nun 8 finis "M11" kaj nur 5 aliĝis al "M12". En "La Informilo" aperis ĝis nun 4 nomoj, do jen la 4 pliaj finlernintoj:

- Sr^o Jacques HERLE, 57380 Mainvillers (gvidita de Sr^o Degrelle) - Sr^o Jean-Claude WOLLFER en Betschdorf (gvidita de Sin^o Busser) same kiel Fin^o Lydia STOLTZ, 67160 Seebach kaj Sr^o Maurice SCHLEWITZ, 68720 Flaxlanden (gvidita de Sr^o Grossmann). Gratulojn!

Nia lasta komuniko al la gazetaro anoncis eblecon ricevi senpagan lecionon de E^o kontraŭ 2 Postmarkoj. Eldonis ĝin SAT-Amikaro; ĝi estis 16-paĝa kaj entenas multajn informojn pri E^o. Ĝis la 15a de aŭgusto nur 3 gazetoj (en departementoj 70 kaj 52,54) aperigis ĝin, venis 2 mendoj (SAT-Amikaro mem ricevis 3 mendojn el nia regiono).

Kelkaj kunlaborantoj de nia P.K^o ne raportis al ni de pli ol 6 monatoj (kelkaj eĉ tute ne en 1 jaro!). Ili bonvolu kiel eble plej baldaŭ informi nin pri la laboro (aŭ nelaboro) de siaj gelernantoj.

Jean-Paul COLNOT

NANCIO



La vesperaj kursoj finiĝis jam meze de junio, ĉar forestis la plej multaj membroj. La unua kunveno de la nova laborjaro okazis en MJC Ph. Desforges, la 20an de septembro je la 20a30. Estis preparata disdono de pli ol 5000 flugfolioj pri E^o (2000 "metodo 4" el UFE kaj 3000 novaj prospektoj). Kurso estos denove provita en la Universitato de Konstanta Kulturo. En MJC ni planas funkciigi unu kurson por komencantoj merkrede je la 19a horo ek de la 11a de oktobro sed tiu horaro povos adaptiĝi al la deziro de la plej multaj interesatoj. Por la septembra kunveno, invito estis dissendita al pli ol 60 personoj en kaj ĉirkaŭ Nancy. Ni planas cetere kursojn 2a- kaj 3a-gradajn, kiel lastjare.

LASTMINUTA SCIIGO

Nova kotizo: pro la plialtiĝo de la federacia kotizo kaj de la abono al "LA INFORMILO", la kotizo de la Perkoresponda Kurso plialtiĝos por la nova lernjaro je 5F. Do kotizo kun libro kaj pedagogiaj slipoj: 185F + eventuala kasedo (55F) = 240F.

 AMIKO DE I.K.E.F.* FORPASIS.

Jean-Claude DURET, Prezidanto de la "Komerco-kaj-Industrio-Ĉambro" de la departemento MEUSE (Francio) estis vera amiko de Esperanto. Li permesis la uzon de nia lingvo tutsame kiel la uzon de la franca, de la angla, de la germana en la eldono de la indekso de la industriaj produktaĵoj de la departemento. Tiu luksa kajero estis publikigita en 1986 je 7500 ekzempleroj, senditaj al ĉiuj francaj ambasadoroj tra la tuta mondo, al diversaj ministerioj kaj al gravaj internaciaj firmaoj.

J.-Cl. DURET iniciatis ankaŭ la integron de la deviga lernado de Esperanto ek de 1988 en la Instituton por Fortigi la Vendistojn (IFV) en BAR-le-DUC.

Ni esperas, ke la postvenanto aprezos kiel li la avantaĝojn de nia internacia lingvo en la tutmondaj komercaj interŝanĝoj.

Ni omaĝas la memoron de Jean-Claude DURET, kiu mortis, 59-jaraĝa, la 16an de junio 1989.

* IKEF: Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (neligita al UEA). Vi povos legi en ĉi-tiu kajero la raporton pri la aludita eksperimento.

KOTIZOJ KAJ ABONOJ 1990

Ek de januaro 1990 la abono al "La Informilo" estos je 45 FF por Francio kaj 57 FF por eksterlando. La federacia kotizo estas je 23 FF

Vi povas pagi ilin ek de nun, ne necesas atendi la aperon de la venonta numero de "La Informilo".

Kiel kutime bonvolu pagi al:

nia poŝtĉekkonto:
 FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
 CCP 1997 72 W NANCY

aŭ al nia kasisto:
 Sr° André GROSSMANN, 5 Rue des Pyrénées, F-68390 BALDERSHEIM
 (sed redaktu vian ĉekon ankaŭ je la nomo de la Federacio)

ORIENT-FRANCA KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO = STATISTIKOJ PRI LA JARO 1989

Abonoj al "LA INFORMILO"	239	B	13	NOVA U uea	4
Federaciaj membroj	117	C	11	NOVA U-K.	1
UFE-membroj kun pago	67	E	7	TEJO	1
Donacoj al la Federacio	3	GEE	21	UEA DM	7
Donacoj por "La Informilo"	6	JFEO	4	UEA MA	23
Perado por kotizoj kaj abono	6	JFEO PM	3	UEA MG	3
Vendo de materialo	3	K	16	UEA MJ	8
		NOVA F	62	UFE DM	4
		NOVA F U	1	UFE MA	53
		NOVA F U u	5	UFE SM	14
		NOVA U	2	e:2	1

 EL LA REDAKTOREJO!... ★

Ni petas niajn legantojn kaj kunlaborantojn sendi raportojn kaj ĉiuj-specajn artikolojn presendajn antaŭ la 20a de novembro, tiamaniere ke nia bulteno 68 povu esti enpoŝtigita antaŭ la finjaraj festoj. Ne forgesu riĉigi la rubrikon: "Nia vivo en..."




P. DENIS
 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR-le-DUC

Antaŭdankon!

31, boulevard gambetta

92130 issy-les-moulineaux



18 / 19^{aj} de novembro 1989

INTERNACIA KULTURA ESPERANTO-FESTIVARO



teatro kaj kanzono

M.J.C. 31, Boulevard Gambetta

F. 92130 ISSY-LES-MOULINEAUX
(cĉe PARIZO)

U.F.E. INVITAS VIN

Aliĝilo

Kompreneble mi partoprenos la 6an INTERNACIAN FESTIVALON en Parizo!

Bonvolu do rezervi por miSPECIALA(J)N ENIRKARTO(J)N por la kvin spektakloj + la literatura forumo.

NOMO: Antaŭnomo:

Adreso:

Telefono:

Mi estas - ne estas - membro de UFE aŭ de landa sekcio de UEA.

Mi antaŭpagas 180 FF
aŭ X..... al Unuiĝo Franca por
160 FF

Esperanto, per.....

L*O*Ĝ*A*D*O

NUR por tiuj kiuj SAMTEMPE antaŭmendas la specialan ENIRKARTON UFE proponas interesan hotelservon.

Bonvolu do krome rezervi por mi ĉambron por jena(j) nokto(j):
de.....al.....

La rezervo validas NUR kun antaŭpago de la tuta sumo
(130 FF X). Farenda nepre antaŭ la fino de oktobro.
Post tiu dato, kontaktu rekte la hotelon:

"IDEAL HOTEL", 11 bis avenue Jean-Jaurès,
92130 ISSY-LES-MOULINEAUX (Tel. 1 46 42 25 63).

.....
ĈIUJ PAGOJ JE LA NOMO DE U.F.E.
(Postĉekkonto: UFE 855 35 D PARIS).

La tuton vi resendu, kun afrankita leterkoverta je via adreso,

al:

DOYE DANIEL
169 Avenue de CHOISY
F - 75013 PARIS

(Tel. 1 45 83 36 25)



JAM LA SESA FESTIVALO!

12

Loko: "MJC", 31 boulevard Gambetta, 92130 ISSY-LES-MOULINEAUX
(Pariza metrostacio "Corentin-Celton", linio 12. Vidu la
mapon dorsflanke. Tre facile atingebla de la centro de Parizo).
Ĉi-jare la festivalo okazas en bela VERA SPEKTAKLEJO, kun
pluraj tre taŭgaj salonoj je nia dispono.

P*R*O*G*R*A*M*O

SABATON, la 18an de novembro:

15.00: KANZONOJ de ĴAK LE PUIL kaj JERZY HANDZLIK
17.00: Studenta Esperanto-TEATRO de Zagreb: "kunveno de birdoj"
Vespermanĝa paŭzo. Ebleco komune manĝi diversloke apude
20.30: VARIETEA spektaklo kun la nederlanda grupo "KAJTO".

DIMANĈON, la 19an de novembro:



10.00: LITERATURA FORUMO: "la nuntempa Esperanto-literaturo"
Tagmanĝa paŭzo.
14.30: TEATRO
16.30: KABAREDO kaj KANTOJ, kun Junulara Esperantista Franca
Organizo - JEFO - kaj ROMAN BURA...

K*O*S*T*O

Unu spektaklo:	: 40 FF
Speciala ENIRKARTO, valida por la 5 spektakloj plus la literatura forumo	: 180 FF
RABATITA PREZO por la membroj de UFE/JEFO kaj por la eksterlandanoj membroj de UEA/TEJO	: 160 FF
Forumo de verkistoj nur	: 20 FF
Hotelĉambro por unu nokto	: 130 FF

(Tio estas la prezo por la ĉambro, ne por persono. Por tiu
sumo vi rajtas esti indiferente unu aŭ du en la ĉambro
(dupersona lito). Venu pare! Estas bona ĵus renovigita tre
pura hotelo, sufiĉe proksima de la festivalejo. La ĉambroj
estas modestaj, kun lavkuvo. Se vi deziras pli luksan,
ekzemple kun banĉambro, kontaktu mem rekte la hotelon.






INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO EN NICO

DE LA 29^a de JUNIO
ĜIS LA 6^a de JULIO

✻ 1990 ✻



*Cravivu unu semajnon da
turisma restado sur la Lazura
marbordo en esperantista etoso...*

7 NOKTTAGOJ EN HOTELO ★★

JE 300 M DE LA MARO

3 MANĜOJ POTAGE



6 EKSKURSOJ PER AŬTOBUSO KA, PLEZURSIPO



500 KM TRA LA PLEJ BELA FRANCA REGIONO

TS = RAPIDU ĈAR LA LOKOJ ESTAS LIMIGITAJ

NUR 50 PERSONOJ

ALIĜILO AL LA INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO

sendota al:

GRUPE ESPERANTISTE de NICE . "Les Hortensias 2".121.B Bd Napoléon III.
F. 06200 . NICE . Francujo. Tel. 93.83.08.73.

Poŝtkonto: GROUPE ESPERANTISTE de NICE . MARSEILLE . 1 107 93.S

VIRO . VIRINO . FAMILIA NOMO:..... PERSONA NOMO:.....

Kompleta adreso (nacilingve en latinaj literoj)

strato:

poŝtkodo:..... urbo: provinco (se necese):.....lando:

naskiĝdato: profesio:..... telefono N°:

mi estos akompanata de: 1°).....aĝo:... 2°)..... aĝo:..

Nomo de la persono kun kiu mi deziras loĝi: _____

Sur la sama aliĝilo skribu nur la nomojn de viaj familianoj. Por aliaj)
personoj plenigu alian aliĝilon. Se necese, kopiu aŭ fotokopiu tiun-ĉi. (

Mi/Ni loĝos en : ĝis la 30a/12 de la 1a/I/90

Ĉambro kun bano aŭ duŝo + WC dulita/dupersona	2400 FF	2500 FF
Ĉambro kun bano aŭ duŝo + WC unulita/dupersona	2300 FF	2400 FF
Ĉambro kun WC SEN bano/duŝo unulita/dupersona	2200 FF	2300 FF
Sen duŝo nek WC unulita/dupersona (nur 5 ĉamb.)	1900 FF	2000 FF
Suplemento por unupersona ĉambro: 700 FF		
Reduktita prezo por infanoj kaj studentoj	1700 FF	1800 FF
Ĝis 25-jaraj. Sendu fotokopion de la stud.karto		

La prezoj estas en FRANCAJ FRANKOJ por UNU persono. Ili entenas:

7 nokt/tagoj en dustela hotelo - 3 manĝoj po tago: vespermanĝo 29a/06 ĝis tagmanĝo 06/07

5 ekskursoj per aŭtobuso - 1 ekskurso per plezurŝipo

senpaga eniro en la plenaera muzeo "NICO - MINIATURO" kaj MARINELAND

PIKNIKO kun ESPERANTA VINO ... BANKEDO ... ADIAŬA VINO ... BONHUKORO ...

ANTAŬPAGO SENDOTA KUN LA ALIĜILO : 500 FF. SALDO PAGOTA ANTAŬ la 1a de MAJO

Hodiaŭ mi pagas _____ FF. per POŬTĈEKO, INTERNACIA MANDATO, FRANCA

BANKĈEKO. Alimaniere ŝanĝaj suplementaj kostoj estas aldonendaj.

Kiuj ne povas sendi monon, tiuj devas certigi pagi je la alveno.

Se por iu grava kaŭzo, iu ne povas partopreni la I.E.S.-on, li rajtas trovi iun anstataŭiganton kaj ricevos la tutan pagitan sumon, minus eventualan sendkoston (nur por eksterlandanoj).

Se neblas trovi anstataŭiganton, post la 1a de MAJO, 100 FF estos detenitaj, post la 1a de JUNIO, 500 FF.

Ni vojaĝos per: AVIADILLO, VAGONARO, AUTOMOBILLO.

Ni alvenos la je la horo.

Mi deziras ke vi rezervu en la parkejo lokon por aŭto. (Mi pagos surloke.) JES

Dato kaj subskribo : _____ NE

NICO-90



PROGRAMO

VENDEDE 29./06. De la 14a, akcepto en la
HOTEL GARDEN FLOWER
Square ZAMENHOF, norde de "Rue Saint-Philippe"
800 m. de la stacidomo - 300 m. de "Promenade des Anglais"
Tel. 93.44.16.33

Kiuj alvenos matene, tiuj povos tagmanĝi en tiu hotelo kaj pagos al la restoraciestro. Kiuj deziros restadi post la 6a/07, tiuj repre devas rezervi la ĉambron pere de la organizantoj, sed pagos al la hotelestro.
Kiuj venos aŭtomobile, tiuj povos parki la aŭton en kovrita parkejo antaŭ la hotelo. Kosto 200 F. por la tuta semajno.

Post komuna vespermanĝo,
I N T E R K O N A V E S P E R O
kun KANTOJ de Michel CAVELAN

SABATE 30./06. Libera mateno aŭ libervola vizito de NICO.
Post tagmanĝo, per aŭtobuso veturado al
N I C O - M I N I A T U R O, plenaera muzeo.
Ĉiuvespere, distra kaj kultura vespero. Kiuj inter la partoprenantoj povas prezenti ion valoran - nek politikan, nek religian - tiuj povas proponi programon al la organizantoj.

DIMANĈE 01./07. Libera mateno. En preparo oficiala kunveno.
Post tagmanĝo, aŭtobusa ekskurso al
M O N A K O kaj R O Q U E B R U N E, pitoreska vilaĝo.

LUNDE 02./07. Post matenmanĝo, per aŭtobuso veturado al la haveno de CAP d'ANTIBES, kie ni enŝipiĝos al
I N S U L O J L E R I N S

Pikniko en la arbareto - ĉiu ricevos senpage manĝaĵon kaj eĉ BORDEZAN kaj ESPERANTAN VINON.
Post vizito de la insuloj, ŝipveturado al CANNES.
Reveno al NICO per aŭtobuso.

MARDE 03./07. Libera mateno aŭ komuna vizito de NICO.
Post tagmanĝo, aŭtobusa ekskurso al
M A R I N E L A N D, spektaklo kun DELFENOJ kaj ORCINOJ
Poste, vizito de vitrofandejo kaj pitoreska vilaĝo, BIOT.

MERKREDI 04./07. Libera mateno aŭ komuna vizito de NICO.
Posttagmanĝo, aŭtobusa ekskurso al
A N T I B E S kun la MUZEO GRIMALDI
V A I L L A U R I S kun la ARTAJ POTAJJOJ

JAŬDE 05./07. Post matenmanĝo, aŭtobusa ekskurso, laŭlonge de la rivero VAR, traveturado de la
TRI GORGOJ "MESCLA", "DALUIS" kaj "CIANS"
BANKEDO en VALBERG, vilaĝo je 1700 m.s.m.n.
Revenante ni trinkos la lokan kaj adiaŭan vinon en TOUL-sur-VAR

VENDEDE 06./07. Post la lasta komuna tagmanĝo ... ĝis la revido

GRAVE KARAJ ALIĜINTOJ al I.E.S., vi povas lasi hejme vian monujon !
Ĉar ĉio estas enkalkulita en la pagita prezo, eĉ la eniro en NICO - MINIATURO kaj MARINELAND.



ENKONDUKO DE ESPERANTO en "I.F.V. 55" (Instituto por Fortigi la Vendistojn)
 ===== F-55000 BAR-le-DUC =====

CELO :

=====
 Proponi kaj adoptigi esperanton kiel pluan fakon en la lernprogramo de la Instituto.

Pruvigi, ke esperanto faciligas la plulernadon de fremdaj lingvoj (ĉiokaze la angla) ; ĝi estas lingvo de kontakto ; ĝi kunligiĝas kun la cetero de la programo.

LERNANTOJ : du specaj

=====
 1°/ gejunuloj 18-26 jaraĵoj, nivelo Bakalaŭro aŭ jam laboris 3 jarojn. Homogena grupo. Ne ŝatas juron aŭ librotenanon, preferas kontaktojn, malfermecon.

2°/ el diversaj devenoj, sen limaĝo, nivelo BEPC sen profesia sperto, malmulte motivigitaj, por labori kiel vendistoj en la regiono.

INSTRUADO de esperanto : 40 horoj en tri fazoj.

=====
 - unua fazo (16 horoj po 4 h dum 4 tagoj), laŭ baza kurso (ĉu Metodo 11, ĉu libro de Ludwig/Triolle).

- dua fazo (16 horoj po 4h dum 4 tagoj), perfektigo surbaze de komercaj tekstoj aŭ gazetartikoloj en rilato kun la intereso de la homoj kaj la aliaj kursoj.

- tria fazo (8 h po 4 duontagoj aŭ du tagoj), venigo de profesiuloj el eksterlando por prelegoj, diskutoj ktp.

Post la unua fazo, eltrovi korespondantojn/adoptajn patrojn el IKEF por skribi al la lernantoj.

Fine de la staĝo, estos liverita diplomo, esperanto povus havi sian lokon, kadre de regula kontrolado de la akiritajoj

BUĜETO :

=====
 Ĉar temas pri kurso samnivela kun la aliaj, la instruistoj kaj intervenantoj estas pagitaj. Repago de la materialo kaj investo (fotokopioj, bendoj, videobendoj ktp) eblas.

KALENDARO :

=====
 En rilato kun la staĝo-ritmo de la Instituto, la kurso pri esperanto enkadriĝis en la 3/5-monata staĝo kiu komenciĝis meze de junio 88 kaj finiĝis en oktobro 89.

INSTRUANTOJ :

=====
 Surloke estas spertulo, kiu tre taŭgas por la unua kaj dua fazoj (instruado + animado per bildoj kaj bendoj) starigi bazan komercan vortprovizion ; trovi dokumentojn (gazet-artikolojn, paĝoj el libro ktp).

BILANCO POST UNU JARO :

=====
 du grupoj ĉeestis la kursojn :

- 13 gejunuloj konsistigis la unuan grupon kaj partoprenis nur la unuan fazon.
- 15 gejunuloj konsistigis la duan grupon kaj finlernis la unuan fazon, nur 6 el ili sekvis la duan fazon kaj komencis interŝanĝi korespondadon kun membroj de I K E F

La tria fazo ne okazis

KIEL TIUJ MISFUNKCIADOJ ?

- =====
 unue, la pedagogia organizado estis neadaptita:
- 4 sekvencoj de 4 horoj estis tro streĉa ritmo
 - la gelernantoj estis nesufiĉe motivigitaj pri esperanto
 - la tradicia lernolibro ŝajnis netaŭga pro la ĝentilafek-teco de la tekstoj

- plue, la staĝanoj estis aparta publiko :
- unua grupo - Temas pri alternada formado : komence 3 monatoj, poste 1 semajno po 2 monatoj en la Instituto, la reston de la tempon ili pasigas en la entrepreno kie ili estas dungitaj
 Kiam oni proponis la duan fazon, ili preferis viziti la klientaron por vendi kaj perlabori monon, anstataŭ ĉeesti kurson de esperanto !
 - dua grupo - Temas pri senlaboruloj, kiuj ne komprenis la avantaĝon por ili lerni esperanton. La kulturaj niveloj de la staĝanoj estis tre malsimilaj. Mezaĝo de la grupo : 23 jaroj.

KAJ LA FUTURO :

=====
 daŭrigi la provon priatentante plej eble :

- la pedagogiajn erarojn
- la heterogenecon de la grupoj

ek de la venontaj staĝoj en oktobro 1989 !

UTILAJ ADRESOJ : S-ro Direktoro François Xavier GILBERT
 =====
 Komercoĉambro de MEUSE
 6 parc Bradfer- F 55000 BAR LE DUC

S-ro Direktoro Gilles ANDRE
 Institut des forces de vente
 8 parc Bradfer- F 55000 BAR LE DUC



★ Esperanto

9. julio 89.

Estimata „la Informilo“.

Korege mi dankas pro la sendita „la informilo“, kiu ĝojigas min. la vojaĝo tra Francio mi tute ne forgesas. Multe da homoj helpis min kaj ĝojigis min. Mi vere vidis Francion.

Mi ne ankoraŭ estas preta ordigi miajn memoraĵojn, mi nur desegnis la vojon tra Francio.

Mi esperas poste, mi povos sendi al ĉiuj gastigantoj mian referanton.

Sed mi unue devas fini mian grandan laboron dum 3 jarojn:

★ skribi katalogon pri 90 jaroj „filatelista

monata revuo“, do 12 × 90 revuoj. Mi faris mian propran sistemon. 19 danaj grupoj, 6 nordaj grupoj kaj 6 mond-grupoj. Ekzemple pri filat. literaturo mi ordigas la titolojn en la orientaj landoj kaj okcidentaj landoj:



mi jam ricevis honordonacon, kvankam mi ne estas preta. Do, mi unue faros tion - pro tio miaj francaj geamikoj devas atendi, pardonu.
Amike mi salutas. Else Marquethe.

El Sinjorino Else NIELSEN al kiu ni dediĉis la ĉefpaĝon de LA INFORMILO n° 66, ni ricevis la ĉi-apudan leteron...

... el Sinjoro KUENY (68 BANTZENHEIM)... "Se vi sciis, Sinjoro JOSPIN!"...

"Kiel fervora esperantisto de nia movado, mi deziris jam delonge kontakti, ne nur plenkreskulojn por paroli al ili pri E^o, sed ĉefe geknabojn, tiuj kiuj havas pli da tempo kaj bonŝanco por vivi tiun eksperimenton, t.e. komuniki per universala lingvo. Jam sensitivita je la malpermeso de nia Ministro pri Edukado lerni la universalan lingvon en lernejo, mi profitu almenaŭ la okazon klarigi al la infanoj de mia vilaĝo tion, kiu estas E^o. La instruistoj, kolegoj de mi, estas malfermitaj je tiu informo. Do, fine de junio... antaŭ la ferioj, en la kadro de la "kultura horo", mi havis tiun ŝancon paroli kun niaj infanoj.

Tre silente kaj konsciencie, ili aŭskultis pri la kreinto de la nova lingvo - mi ĝia prezentis tion kiel historieton, facile kaptibla de la junuloj - kaj post horokvarono mi aludis pri la facileco de la prononco kaj de la skribado. Mi precizigis, ke oni neniam povas fari eraron skribi: kia ĝojo!... Mi petis iun infanon skribi sur la nigra tabulo kelkajn vortojn... Nekredeble! Ili miris, ĉar ili faris nenian eraron. Sensacia! Ili kriis: ...Daŭrigu!... kaj pluvalvenis la demandoj, ĉefe la tia: Kial oni ne lernas tiun lingvon en lernejo?

Mi hontis por nia Ministro... kion kaj kiel respondi krom tio, ke neŭtraleco ĝenas la registaranojn, kaj ke oni ne bezonas ilin por lerni E^on kaj komuniki tre facile kun alilandanoj. Vere ili estis tre entuziasmaj. La informadojn mi donis trifoje po unu horo en tri klasoj de ok ĝis dekunu jar-aĝaj infanoj. Estas vera plezuro por mi kontempli la malfermitecon kaj intereson de la infanoj. Oni ne "laboris" aŭ "peris" tra la neregulecoj, ni ludis kune! Ho, se vi sciis, Sinjoro Jospin! Mi ŝatas doni tiujn informojn fronte al plenvivaĝ infanoj. kiu aŭskultas kun "buŝo kaj oreloj malfermitaj"! Jes, mi opinias, ke ĉiuj esperantistoj devus klopodi por same informi en la elementaj lernejoj."

...el Sinjorino ANDRE (55-BAR-le-DUC), kiu ĉeestis nian lastan staĝon en VILLERS:

"... Depuis le temps que j'entendais parler de l'espéranto à la maison, je n'ai pu refuser la proposition de mon mari: participer à un stage qui se déroulait à VILLERS lès-NANCY.

Un peu sceptique au début, j'ai très vite apprécié l'intérêt du stage et de la langue espérantiste. Après quelques heures de cours d'initiation, j'ai pu dire mes premiers mots dans une ambiance internationale très sympathique.

Aujourd'hui, je suis décidée... je me mets à l'espéranto!"

.. el Sinjoro Gérald MOUROT (68-RIXHEIM)

" Jam, mi legis en ĵurnalo artikoleton pri la internacia lingvo Esperanto. Mi kontaktis do S-ron KUENY mian instruonton, kiu klarigis al mi la historion de la lingvo kaj la vivon de ĝia fondinto, Dr° ZAMENHOF. Tre interese, mi decidis ĝin lerni.

Post ses monatoj da lernado, mi partoprenis mian unuan staĝon en VILLERS-lès-NANCY, la 27/28ajn de majo 1989. Dum du tagoj, ĉirkaŭ sepdek esperantistoj loĝis en la

MAISON de L'ASNEE. Post fervorega akcepto, mi ĉeestis perfektigan kurson, gvidita de S-ro LUDWIG. Mi timiĝis, kiam mi, komencis la "15an METODON" sed, tre rapide, mi konstatis, ke mi komprenis preskaŭ ĉion, kaj ke mi povis esti komprenata!

Vespere, nia geesperantistaro vizitis la urbdomon de Nancy kaj post la vespermanĝo ni ĉeestis tre interesan "Son et Lumière" sur la Placo Stanislas.

Post necesa nokto de ripozo kaj abunda matermanĝo, mi forte interesiĝis pri la libroservo, kie mi aĉetis plurajn librojn. Posttagmeze, mi ĉeestis la "ĝeneralan asembleon" kaj malgraŭ la fervorega etoso ni devis rehejmiĝi. Tre kontenta kaj kuraĝigite, mi veturis al Mulhouse".

INVITO DE GERMANA ESPERANTO-ASOCIO

= Porfamilia Semajno dum Paskaj Ferioj en Nigra Arbaro =

=====

Germana Esperanto-Asocio ekde 1985 ofertas familian ferio-semajnon dum Pasko, kiu trovas ĉiujare kreskantan intereson. Ĉi-jare oni devis malakcepti multajn informpeŝtintojn, ĉar la 60 lokoj estis jam meze de la antaŭjara decembro okupitaj. Nepras do tre frua aliĝo al la suba organizantino, kiu volonte komunikas pliajn informojn.

En 1990, la "6a Printempa Semajno Internacia" (PSI) okazos de la 13a (tio estas la antaŭ-paska vendredo) ĝis la 20a de aprilo, en la montara vilaĝo TODTMOOS, meze de la suda Nigra Arbaro, en sud-okcidenta Germanio, do intence proksima al Francio, Svislando kaj Italio. La aranĝo estas ĉefe por familioj, sed ankaŭ por ĉiuaĝaj aliaj personoj, kiuj ŝatas familian etoson. En la programo troviĝas kompreneble E^o-kursoj, sed abundos ankaŭ distraĵoj, slojdokursoj, promenadoj kaj montomigradoj. La regiono elstaras pro la senpera naturo kaj altaj montoj (ĝis 1400 m) kun belega panoramo.

La kotizoj entenas ĉiujn manĝojn, tranoktadon kaj kursojn (sen materialo) kaj varias de 80 GM por infanetoj kaj 120 GM por lernejaĝaj infanoj ĝis 230 GM por plenkreskuloj. Skribu laŭeble plej baldaŭ al

Hedwig FISCHER
Gustav-Adolf-Str. 2a,
D-4418 NORDWALDE
(tel.: 2573 626)

————— ☆
COLMAR

Kunvenis marde, la 12an de septembro, en Colmara restoracio, deko da esperantistoj por diskuti pri estonta agado. Estis decidite pri ĉiumonata kunveno, la duan mardon de la monato.

Prezento de esperanto okazos la 29an de septembro en la kadro de Colmar-Accueil. Ĝin prizorgos Sinjorino LUTZWILLER kun helpo de Sinjorino IMBERT el Jugoslavio.

————— ☆
VIDEO-FILMOJ kaj SON-KASEDOJ

La Aŭd-vida Centro de SARLANDA ESPERANTO-LIGO proponas al interesataj samideanoj imponan liston de videofilmoj kaj sonkasedoj pri kulturaj semajnfinoj. Skribu al

Günter BECKER
Alter Hangarten
D-6653 BLIESKASTEL


Cetere (vidu n^on 66 de LA INFORMILO) S.E.L^o organizas sian 34an kulturan semajnfiron en HOMBURG-Saar, de la 8a ĝis la 10a de decembro. Spertajn esperantistojn devus certe allogi la prelego de Doktoro Ulrich LINS, aŭtoro de la verko "La danĝera lingvo".

Informoj ĉe:

Sarlanda Esperanto-Ligo
Querstr. 11,
D-6607 QUIERSCHIED



distra angelo



KRUCVORT-ENIGMO

HORIZONTALA

1 publika vendo - slojdebela palmo (r). 2 longa osto - kampobirdo - prepozicio. 3 supera estaĵo mezurunuo (r) - prefikso - germana antikva litero (r). 4 koralbesto (r) - fabriko (r) - prefikso. 5 aroma trunkoŝelo - forigi difekton (r). 6 tute simila (r) - sensebla estiĝo - lokigi (r) 7 estonta birdo (r) - kuracilo (r) - perfekte senreliefa (r). 8 iama hejma servisto - aktoro. 9 mardiano - specio de poplo (r) - malgranda birdo (r). 10 sudamerika mamulo (r) - determina adjektivo - senmoviĝo cele foton (r) - lirika poemo (r). 11 gumrezino (r) - fortika tondilo.

VERTIKALE

1 granda risko (r) - antaŭ la paleolitiko. 2 donnarbedo (r) - rampulo (r) - prepozicio. 3 nodo (r) - anesteziĝi. 4 malnova mezurunuo (r) - el ia kaŭzo - en ia loko - longa kava cilindro (r). 5 sankta bildo (r) - parto de la ina brusto (r) - perfekte kvarangula. 6 diboĉo - perdi vivon. 7 por movi boaton (r) - rustfungo buŝknedo (r). 8 fariĝi - longa stango - greka litero. 9 eta paperdokumento - globo. 10 plibeligi (r) - ĝisfi ne difekti (r). 11 muzika intervalo (r) - korporgano - rivereto (r). 12 parto de laguno - ĉerpi - konjunkcio

SILABENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vorteroj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

ano ap bu bur ci eg eo er et fe he ia ido iko il ip is is le lo ma mo mu no no od or ov pa ra re re rem ro si so so sti te tio to to to ve

1	+ - - + - -	ĝi produktas galon
2	+ - - + - -	Ulis-aventuro
3	+ - - + - -	serpentosimila fiŝo
4	+ - - + - -	virnomo
5	+ - - + - - -	lando
6	+ - - + - -	Frigia dio
7	+ - - + - -	ne praktika
8	+ - - + - - -	insekto
9	+ - - + - -	revolucia konsilio
10	+ - - + - -	virnomo
11	+ - - + - -	specife kuiri
12	+ - - + - -	kompetente taksi
13	+ - - + - - - -	repago
14	+ - - + - - - -	toksiĝo
15	+ - - + - - - -	islama ermito

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (n°66)

KRUCVORT-ENIGMO: kaperi bradip okul eol epod lontan amoni urtiko zizifo tri trovi uri alio eno riz obio rabd isto goel-et kecal ablacio vali reb lign iru op slip rulad ni otus paso libr

SILAB-ENIGMO: "Mensogu kiom vi volas, sed memoru, kion vi parolas!"

Neuf langues officielles

YOUR YEUX BEAUTIFUL
MARQUISE MÊ RÉVER
FONT. VOSOTROS EYES
ME HACEN RÉVER DI
AMOR. SCHÖNE MARQUISA,
VOS OCULARES MACHEN MICH
TO LOVE GAMBERGING

VIVE
L'EUROPE



...le nouveau "Bourgeois Gentilhomme", revu par Delestre, le talentueux dessinateur de L'EST REPUBLICAIN!...

Delestre